



SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales) - ☎ 34.38.84

JARA ABONO : 5 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

4-an Kvaronjaro 1973

N° 49

AUTŬNA LABORKUNSIDO DE LA FEDERACIA KOMITATO

La 21-an de oktobro 1973 dudeko da gesamideanoj ariĝis, en Narbonne, ĉe la junulgastejo kiel kutime. Nur 6 el la 11 elektitaj komitatanoj ĉeestis kaj 3 petis senkulpigon.

Du gravaj aferoj troviĝis en la tagordo, nome la elekto de la federacia estraro kaj la budĝeto de nia federacia ligilo "Sudfranca Stelo" (SFS).

A. - FEDERACIA ESTRARO - Pro manko de 5 komitatanoj ni devis prokrasti la elekton de la estraro. Tiu situacio tamen ne devas eterniĝi kaj estas tre dezirinde ke la estraro estu elektita antaŭ la venontjara federacia kongreso, kiu okazos en Béziers. Por tion fari restas unu solvo: voĉdoni per korespondado intertempe, kompreneble, la estraro restas sensanga.

Laŭstatute la estraranoj estas elektataj de la 11 komitatanoj kaj apartenas al la komitato. La 11 komitatanoj estis elektitaj en Alès (vidu SFS n° 47). Por ke ni povu plani baloton per korespondado estas nepre necese, ke, plej baldaŭ kiel eble (ni ne eterne prokrastu la aferon), ĉiuj la 11 elektitaj komitatanoj, ĉu parole ĉu skribe, respondu la jenajn demandojn:

1 / Komitatanoj kiuj jam estis estraranoj:
- ĉu vi deziras konservi vian antaŭan postenon ?
- ĉu vi deziras transpreni alian ?

2 / Komitatanoj kiuj ne estis estraranoj:
- ĉu vi deziras kandidatiĝi por iu ajn posteno en la nova estraro ?

3 / Federacianoj kiuj ankoraŭ ne estas komitatanoj:
ĉiu federaciano povas kandidatiĝi por kiu ajn posteno en la nova estraro aŭ kiel simpla komitatano. Lia elekto estos proponata okaze de la venontjara kongreso en Béziers.

B. - "SUDFRANCA STELO".

1 / Jarabono 1974 - Konsiderinte la esprimitajn opiniojn ĉu skribe ĉu parole la ĉeestantoj adoptis la jenan kompromison:

a/ simpla jarabono: 3,00 F.
b/ subtena abono: 5,00 F.

2 / Budĝeto -

Gis nun estis du problemoj, kiuj tre malhelpis la financon situacion:

a/ La jarabonoj estis enkasigataj laŭlonge de la tuta jaro kio malhelpas financon planon. Ĉiu, je sia skalo, pagu aŭ instigu la pagon de la jarabonoj

(cetero tio validas ankaŭ por ĉiuj kotizoj) je la fino de la antaŭa jaro aŭ frue komence de la abonjaro.

b/ Post la apero de ĉiu numero de SFS, S-ro FRUS sendis la fakturon al S-ro DELIGNE por pago.

Per tiu sistemo la rezulto estas ke, ĉi-jare, ni verŝajne havos etan deficiton en la buĝeto de la bulteno ĉar oni elspezis sen scii, precize, la disponeblan monsumon por ĉiu numero.

La ĉeestantoj adoptis sistemon tute inversan.

Nia federacia kaso estas nun profita. Parte oni tion ŝuldas al S-ro FRUS kiu presis por ni propagandafiŝetojn je tre modesta prezo kaj kies vendprofito eniras nian komunan kason.

Do, ĉar ni havas disponeblan monon, nia federacia kasisto, S-ro DELIGNE, disponigos al nia amiko FRUS la tutjaran buĝeton 1974 de SFS. La kalkulbazo estas simpla: po ĉiu aperonta numero de SFS S-ro FRUS ricevos de S-ro DELIGNE kvaronon de la 4 fakturoj 1973. Oni povas kalkuli kaj esperi pri multnombraj "subtenaj abonoj" por ŝtopi la deficiton. Poste, laŭlonge de la pagoj, la enkasigotaj jarabonoj por SFS eniros la komunan kason, sed ĉiam en la rubriko "abonoj por SFS".

Ŝajnas, ke per tiu-ĉi sistemo ni pli facile scios, kien ni iros kaj la tasko de S-ro FRUS estos plifaciligata, ĉar por ĉiu trimonata numero li antaŭscios la disponeblan monon kaj, tiamaniere, li povos pli facile kalkuli la amplekson aŭ la prezenton de ĉiu numero.

Al S-ro FRUS iras ĉiuj niaj plej varmaj dankoj kaj gratuloj pro la bonega farita laboro ĉar per modesta buĝeto (la jarabono estas vere tre malalta) li havigas al ni federacian ligilon, kiun envas al ni multaj federacioj aŭ fakasocioj.

C/ FEDERACIA KONGRESO 1974.

Ĝi okazos en Béziers ĉu la 10-an, ĉu la 17-an de marto.

notu bone: La nacia kongreso de U.F.E. okazos en Saint-Etienne de la 30-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 1974.


S-ro RAYNAUD informis nin, ke nun, en Alès, li gvidas kurson de Esperanto por 15 gejunuloj, 20/30 jaraĝaj, kiuj laboras ĉe firmo de Alès. Estas la kultura fako de la kooperativo de la koncerna firmo kiu pagas, po 15,00 F. por ĉiu kurso de ĝia laboristo/lernanto.

Gravega sukceso por nia meritplena amiko kaj por Esperanto.

S-ro DELIGNE prezentis al ni 5 el siaj gelernantoj kiuj, post-tagmeze, trapasis la "ateston pri lernado". Kelkaj jam tre flue parolas. Al la ceteraj nur mankas iom da maltimemo, sed tio ja estas facile riparebla afero.

Ni devas sincere gratuli Gesinjorojn DELIGNE kiuj, per samideaneco kaj agemeco sciis revigligi tre simpatian grupon.

(Protokolis Jean AMOUROUX, federacia sekretario)



FONDUSA DOMO

La nova sidejo de U.F.E., 4 bis rue de la Ceriseraie, 75004 PARIS, estos oficiale inaŭgurata la 5-an de decembro 1973 je la 16-a.

Tamen la "fonduso domo" ne estas fermita kaj U.F.E. ĉiam danke akceptas la mondonacojn ĉu grandajn ĉu malgrandajn. Oni devas nepre precizi : "por la fonduso domo". Estas eble pagi ankaŭ pere de la poŝtkonto :

C.C.P. PARIS 855-35 Union Française pour l'Esperanto.



* ANGULO DE LA KASISTO *



Kiel ĉiujare, mi turnas min al vi, membroj de nia Federacio Languedoc-Roussillon, ĉar, kiel ĉiujare revenas la tempo antaŭvidi la pagon de niaj kotizoj.

Kiel ĉiujare, miaj petoj kaj konsiloj estos la samaj.

Bonvolu pagi viajn kotizojn NE AL MI, sed al viaj lokaj kasis-
toj. Tiuj-ĉi bonvolos arigi la ricevitajn kotizojn, kaj sendi ilin al mi, ekzemple je la fino de ĉiu monato.

Mi jam sendis la novajn tarifojn al ĉiuj lokaj kasisoj, sed mi opinias ke tiuj tarifoj devas esti konataj de ĉiuj, pere de nia federacia ligilo, Sudfranca Stelo.

COTISATIONS POUR UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO.

A - Cotisations donnant droit à :

- 1er - Cartes de Membres UFE-UEA
- 2eme- A la Revue Française d'Esperanto
- 3eme- Au bulletin "Esperanto Actualités"

Membre Titulaire (+ 26 ans)	50,00
Membre Titulaire Junior (- de 26 ans).....	50,00
Membre Titulaire Junior (- de 22 ans).....	34,00
Membre donateur	70,00
Membre Bienfaiteur	110,00
Membre Titulaire à vie	1 000,00
Membre Donateur à vie	1 400,00
Membre Bienfaiteur à vie	2 200,00

B - Membre adhérent sympathisant 8,00

Kotizoj por U. E. A.

Membroj ĝis 21 jaroj

Membro kun jarlibro (JMJ)	17,00
Membro abonanto (JMA)	51,00

Membroj de 22 ĝis 25-jaroj

Membro kun jarlibro	(MJ)	34,00
Membro abonanto	(MA/K)	68,00

Membroj pli ol 25 jaroj

Membro kun jarlibro	(MJ)	34,00
Membro abonanto	(MA)	68,00
Membro subtenanto	(MS)	102,00
Dumviva Membro	(DM)	1 360,00

J - MJ kaj MJ ricevas la Jarlibron
 MS kaj MA ricevas "Esperanto" + Jarlibron
 JMA kaj MAK : kiel MA ≠ "Kontakto"


al tiuj kotizoj, mi devas aldoni ke dum sia kunveno en Narbonne, la federacia estraro decidis krei por Sudfranca Stelo "Subtenan abonon" je la prezo de 5,00 Frankoj.

Tiel estas lasite al la elekto de ĉiu la eblon pagi :
 3,00 frankojn kiel pasintjare
 5,00 se oni opinias ke nia bulteno valoras tiun prezon.

Konfidence : Sub la sigelo de la sekreto, mi opinias ke se iu deziras tuj pagi sian kotizon por 1974, UFE ne rifuzos !

Ankaŭ kiel ĉiujare, al ĉiu el vi mi sendas miajn plej bonajn bondeziroj okaze de la nova jaro. Bonan sanon al ĉiu, kaj multajn novajn lernantojn al ĉiu grupo.

Maurice DELIGNE.



COTISATIONS POUR UNION FRANÇAISE POUR ESPERANTO

COTISATION 1974

Fédération	2,00 F.
Abonnement Sud France a Stelo /	
a) Simple.....	3,00 F.
b) de soutien	5,00 F.


C. C. P. Fédération départementale du Gard pour l'Espéranto
 Montpellier : 1 857 07.

K R U C V O R T O J

Horizontale

* Esperantaj vortoj

- 1- Louis XIV fonda celui de Paris en 1662
- 2- Instrument de musique —
Entrer profondément (R)
- 3- Dans le crâne (R) — Département français (R)
- 4- Mélodie (R) — Ensemble d'instruments — Négation
- 5- Conjonction — Sans corrections ni taches
Partie du finit (R)
- 6- Faire en sorte de ne pas rencontrer
Note de musique
- 7- Vêtements sacerdotaux
Instrument de musique (R)
- 8- Motule (R) — Signale un danger (R) — Meuble (R)
- 9- Interjection ou conjonction — Arme à feu (R)
- 10- Nous l'employons
- 11- Deux lettres de "dernier" — pronom personnel —
A vau l'eau (R)
- 12- Sensibilité (R) — Habitant d'un pays d'Afrique.



R. Raymond

Vertikale

* Francaj vortoj

- 1- Hazardaj — 2- Trinkajo — Flavruĝa — 3- Akrasona — 4- Ĉiu el la ĉefepokoj
Ili ventolas — 5- Kran-fabriko — 6- (Li) starigis (Li) iras)
- 7- Presentanta malgrandan dikecon — Eksalto
- 8- Persona pronomo — Ronĝulo — Prefikso signifanta ekstrema eksternormala
- 9- Nedefinita pronomo — Inverse: graka litero — Renkonti viziti.
- 10- Sulkorado — Ĝi estas nealirebla piede — Li iras.
- 11- Voĵplano —
- 12- Zio kio plibeligas — Muziknoto.


* (R) — nur radiko

* La solvo aperos sur la venonta S.F.S.


Solvo
 de la krucvortoj
 aperinta sur la N.º 48

M	A	L	D	I	L	I	G	E	N	T	A
O	L	E	O	O	V	O	U	A	T		
U	L	U	L	T	R	A	M	A	R		
C	E	D	R	O	E	L	I	G	A	S	
H	E	R	O	J	N	S	E	B	O		
A	S	O	N	E	P	R	E	U	L		
R	L	U	T	R	O	R	U	S	A		
D	U	E	A	F	I	D	A	T	I		
E	T	F	I	S	A	B	L	E	R		
R	I	M	E	N	O	G	L	O	R	E	
A	L	I	R	B	L	U	E	T	A		
S	E	L	R	I	M	E	S	S	I		


5 minutoj da intervalo



Kiu diris, ke interne de tiuj modernaj domoj nenion entenas?



Rigardu, kion diras mia horoskopoj hodiaŭ?




Konfesu! kun kiu vi perfidis min.



Ne insistu! Mi certigas vin ke la gesinjoroj forestas.



Tio estas atenco al preslibero!



Kiam vi atingos tiun linion, turnu maldekstren kaj vi estos alveninta.

R. Fms



“Impresoj el la Centra Oficejo” (U. E. A.)

Kiam oni ekinteresiĝas pri la Internacia Lingvo, oni starigas al sia instruisto amason da demandoj pri ĝia origino, oni scivolas pri ĝia historio, literaturo originala kaj tradukita. Surbaze de tiuj gravaj nocioj konstruiĝas la laboro por plibonigi la interrilatojn kaj interkompreniĝon de la homoj en la mondo. Kiel funkcias hodiaŭ la movado? Kie troviĝas la sidejo de UEA? Kiamaniere tiu "pacarmeo" dissendas al la homaro novaĵojn pri la aktuala vivo de nia lingvo?

Mi forte sentis la neceson ĉion ekscii, de la unua tago kiam mi ekkonis Esperanton. Nun mi plenigis tiun mankon, ĉar antaŭ kelkaj semajnoj mi decidis viziti Nederlando. Cefe instigis min realigi tiun revon la fakto, ke mia fratino Maria laboras, de ĉirkaŭ unu jaro kaj duono, en la Centra Oficejo de UEA.

La iama Internacia Esperanto-ligo havis en Anglujo sian propran domon dank'al donaco de ges. Dinslage en 1936. Samtempe funkciis en Genevo UEA, kiu dum la dua mondmilito pro la situo en neŭtrala lando povis fari humanisman laboron por militviktimoj, helpi kontakton inter dividitaj familioj, ktp. Poste la du organizadoj kunfandiĝis, kaj en 1954 speciala komisiono de la estraranoj de UEA decidis vendi la domon en Anglujo kaj aĉeti novan sidejon en Rotterdam, kun interkonsento kaj monkontribuoj de multaj el membroj.

La domo de UEA situas urbocentre, en strato Nieuwe Binnenweg 176. Gi estas facile atingebla de ĉiuj anguloj de Eŭropo. La konstruaĵo mem estas tipe laŭ la nederlanda stilo, ruĝaj brikoj kun blankaj motifoj kiuj ĉirkaŭas la grandajn fenestrojn.

Enirinte la domon tra la ĉefpordo, oni rimarkas blankan ŝtuparon el marmoro, maloftaĵo en Nederlando. Post ĝi oni trovas maldekstre la direktorejon. La nuna direktoro estas d-ro Victor Sadler, kiu bonvenigis mian familian karavaneton: tuj komenciĝis agrabla interparolo pri la uzo kaj utilo de la domo de UEA.

la unua ricevita impresoj, kiu poste restas, estas la simpleco kaj afablo per kiu oni akceptis nin. Oni rimarkas homon kiu dediĉas siajn tutajn fortojn kaj atenton al la internacia lingvoproblemo. Tiel la malvarmeo, kiu povas ekzistis inter personoj kiuj ankoraŭ ne sin konas, malaperas. D-ro Sadler krome havas kaŝitan manieron disradii simpatian al la vizitantoj.

Dum mia vizito tra la domo, mi vidis ke ĉiu ĉambro estas momita laŭ eminenta esperantisto aŭ landa asocio, kiu finance helpis, aŭ kontribuis por ĝin mebli. Mi trovis interalie ĉambron dediĉitan al la prezidanto de Langvedoko-Rusiljono, s-ro René Llech-Walter.

La plej vizitinda estas certe la biblioteko en la ĉambro Kanado kun aŭtentikaj mebloj, kaj seĝoj kiuj portas la blazonoj de la diversaj provincoj de Kanado; ĉiuj mebloj kaj lignaĵoj estas skulptitaj el originala ligno. La kolekto mem estas inter la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj.

Forte sentebla estas la internacieco de la oficistaro: el Brazilo, ĉeĥoslovakio, Italujo, kaj Britujo, sen forgesi la nederlandajn. Tamen laŭ Zamenhofaj vortoj, "Tie laboras nur homoj". Oni devas ankaŭ mencii la konsciencecon de ilia laboro, ĉar vere oni sentas kurenton da aktiveco, la bruon de tajpiloj kaj kompostilo, kiu apenaŭ haltas de la mateno ĝis la vespero.

La preparlaboroj por la jarlibro kaj por la revuoj "Esperanto", kontakto, kaj aliaj, estas komplete farataj en la oficejo. La presejo ricevas poste la paĝojn jam fotitaj por presado.

Sube estas la ekspedejo : neimagrebla estas la laboro por enpaki kaj sendi ĉiajn presaĵojn tra la tuta mondo.

Ankaŭ en la kelo, gajmiene akceptas la vizitantojn la libroservisto. Tie oni povas longe rigardi kaj eventuale aĉeti inter multaj bele ekspoziciataj libroj. La komerco floras.

Ciutage la domo fariĝas pli plena kaj la laboro pli prema. Verŝajne iam la domo ne plu sufiĉos, kaj ankaŭ ne la geoficistoj : kio devas esti bona aŭguro.

(1) - Motifo, fr motif : arkitektura ornamaĵo. générale répétita

Roberto FRUS

FÉDÉRATION DÉPARTEMENTALE DU GARD POUR L'ESPERANTO

Notre action en 1973

Les élections législatives nous ont offert l'occasion d'attirer l'attention des candidats sur le problème de la Langue internationale.

La brochure de M. ROUGETET : "Une langue commune a tous les peuples du monde a été diffusée à plus de 100 exemplaires".

300 personnes ont été interrogées au cours de "Enquête sur la langue internationale Espéranto".

Des cours publiés fonctionnent à Nîmes et à Alès.

Grâce à la Subvention du Conseil Général, nous avons pu offrir des ouvrages sur l'Espéranto aux bibliothèques municiplaes ou pédagogiques de Nîmes, Alès, Aubais.

Notre Fédération a d'autre part été représentée aux Congrès européen de Luxembourg et universel de Belgrade et international de Toronto.

René RAYNAUD

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépôt légal : 4^{ème} trimestre 1973



FEDERACIA KONGRESO

Dimanĉo 10 Marto 1974, en Béziers

Je la 9-an precize malfermo ĉe la Komuna ĉambro. Aleoj Paul RIQUET.

Je la 12-an tagmanĝo ĉe Restoracio "La Daurade" (proksime subprefektejo) prezo 16 F. (entenata vino kaj trinkmono).

MENUO : antaŭmanĝo
omleto aŭ fiŝo
verdaj fazeoloj aŭ frititaj terpomoj
steko aŭ boviŝteko (escalope)
fromaĝo aŭ flano aŭ glaciaĵo aŭ frukto.

Ĉar posttagmeze oni vizitos la "Oppidum d'Ensérune". (3 F.) oni povas sendi la monon kun la tagmanĝo (19 F.) al Madame AUTHIER C.C.P. 599-14 Montpellier.

Bonvolu sendi vian aliĝon kun la monon al S-ino Suzanne AUTHIER, 9, Rue Georges Picot - 34500 BEZIERS dum Februaro.

Por iri de Béziers al Ensérune ni uzos proprajn aŭtomobilojn.

Tiuj kiuj venos per trajno aŭ aŭtobuso bonvolu averti S-ino AUTHIER kaj tiuj kiuj havas liberajn lokojn en la aŭtomobilo agu same - Dankon.

Ne forgesu skribi kiel eble plej rapide, al S-ino AUTHIER, por via aliĝo al tagmanĝo kaj ekskurso kaj informi ŝin pro viaj vojaĝkondiĉoj.

Mi petas vin diskonigi tiujn informojn al la membroj de via grupo.

Ni pardonpetas la legantarojn pro malfruiĝo de ĉi numero de S. F. S. sed pro teknikaj kialoj ne estis eble fari alie.

La Prezidanto,
René LLECH-WALTER.